Joseph Düpjohann,

# Honesteco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Agu ĉiam kun honesto,
ĉu ĝojigos ĝi aŭ ne!
Vi malfermu vian koron
ĉiam por alia hom'.
Ne demandu pri kompens',
restu nur honesta hom'!

Kiam en malĝojaj tagoj
afliktita estas vi,
eble vi demandos tiam:
Kial restas sola mi?
Se forlasas ĉiu vin,
restu nur honesta hom'!

Estu ĉies proksimulo,
rekte vi rigardu lin,
kaj la homo plej mizera
estu via kara frat'.
Ne demandu pri kompens',
restu nur honesta hom'!

*Traduko de la Basgermana poemo "Anstännigkait" de* Joseph Düpjohann *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-253-513 (2004-07-01 12:39:02)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*